n-ro 4, Julio-Decembro 2012

# ESPERANTO*INFO

*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

La registaro de Katalunio anoncis nepagipovon de la sola eta konsentita subvencio. Aperis neatenditaj pagoj. La financa situacio de Kataluna Esperanto-Asocio estas, laŭ nia kasisto, ege kriza.

Tamen, mi rimarkas, ke lastatempe la engaĝiĝo, laboremo kaj iniciatemo de pluraj asocianoj kreskis ĝis niveloj neatenditaj: ni fervore danku tiujn kiuj peras, tradukas, instruas, prelegas, organizas, diskonigas, verkas, administras, kuraĝigas... aŭ simple partoprenas.

Danke al ili, kaj al nia kapablo adapti niajn aranĝojn al la nova kriza tempo, nia agado daŭre pluas sukcese.

Ferriol Macip



HEDWIG FISCHER

*Partoprenantoj de la renkontiĝo en la urba parado de gigantoj*


## ESPERANTO* CAT

*Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2012:
individua abonanta membro, 64 eŭroj;
pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,
Agència 001, Barcelona
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
UEA-konto: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:
Prezidanto: Carles Vela;
sekretario: Gerard Sugranyes;
vicprezidanto: Josep Franquesa;
kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj: Àngels del Pozo, Llibert Puig, Montserrat Franquesa kaj Ramon Perera.



Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental),
Països Catalans/Kataluna Landaro
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633
Ret-adreso: info@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat


## 9A INTERNACIISMA RENKONTIĜO

La 9a Internaciisma Renkontiĝo okazis la lastan semajnofinon de junio en Canet de Mar. La renkontiĝo koincidis kun la urba ĉefa festo, danke al kio la ĉeestantoj povis ĝui artfajraĵojn ĉe-plaĝe, junajn festojn, koncertojn, balojn kaj la magian nokton per parado de gigantoj, drakoj kaj aliaj kartonaj bestoj kaj diabloj ĵetantaj fajron.

Krom la festa programo, elstaris programeroj kadre de komuna eŭropa projekto pri interkultura edukado kun franciaj, germanaj kaj svisaj partneroj. Krom interesega prelego de Viktoro Solé pri "muzikaj efektoj", Rubén Fernández atente kaj komplekse klarigis pri "Akceptado de enmigrintoj en la katalunaj lernejoj" kaj Rudolph Fischer prelegis pri "Kiel lingve trakti la du seksojn".

La renkontiĝo gastigis kurson de Esperanto gvidata de Pedro M. Burutxaga, lud-atelierojn gvidatajn de Abel Montagut kaj prezenton de Agenda de la terra ["Agendo de la tero"].

Okazis ankaŭ strategia laborkunveno pri diskonigo de nia asocio kaj eksterordinara asembleo, kiu elektis Gerard Sugranyes kiel novan sekretarion de la asocio.

## BIBLIOTEKO MOLERA ĈE TV3

En intervjuo por Telenoticíes Comarques de TV3 Anna Maria Molera prezentis la bibliotekon Ramon Molera de Moià kaj sian katalogan laboron.

Ramon Molera (1922-1983) esperantistiĝis kiel dekkvinjarulo, tiel fervore, ke "je la komenco mi fidis esperantigi la tutan landon en malmulte da tempo". Molera estis ĉefdelegito de UEA kaj peranto de la plej gravaj esperantaj gazetoj. Lia pasio por la internacia lingvo igis lin kunigi gravan kolekton de esperantaj libroj kaj ĉefe gazetoj.

La tasko de Ramon Molera, Lluís Hernández (fondinto de la Muzeo de Esperanto de Subirats) kaj la hungaro Árpád Máthé fruktodonis en 2010 per la unua volumo de Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto, 1155-paĝa volumo, kiu enhavas

bibliografiajn detalojn de 14 143 titoloj el 120 jaroj.

Anna Maria, filino de Ramon kaj dumviva membro de KEA, daŭrigas la ĝisdatigon de la biblioteko, kiu enhavas, inter aliaj juveloj, la unuan revuon en Esperanto, redaktitan de Zamenhof mem en la jaro 1889.

La katalogo de Biblioteko Molera estas nun rete konsultebla ĉe *www.biblioteko-molera.org*.

## KURSFINA VESPERMANĜO EN SABADELL

La 6an de julio okazis en nia sidejo de Sabadell la kursfina vespermaĝo, kie la tradicia kuskuso, salatoj, tomatita pano kaj specialaj bieroj kunigis dudekon da homoj en tipa antaŭsomera malstreĉa etoso.

La bilanco de la ĉi-kursaj klasoj estas sufiĉe pli alta ol dum pasintaj jaroj.

## TAGOJ POR LA MEMMASTRUMADO 2012 EN CAN PIELLA

La pasintan 28an de julio, la Asocio por la Konservado de Can Piella invitis la Centron de Esperanto Sabadell prezenti atelieron pri Esperanto okaze de la “Tagoj por la Memmastrumado 2012”.

Can Piella estas farmbieno de la 18a jarcento ĉirkaŭita de vastaj terenoj kaj situanta en unu en la maloftaj kamparaj terenoj ankoraŭ ekzistantaj apud Santa Perpètua de Mogoda kaj La Llagosta. En 2008, pro ĝia situacio de kompleta forlaso, civitana grupo decidis denove vivigi ĝin. Ili renovigis la domon kaj organizis tie aktivaĵojn cele al restarigo de kampara praktiko daŭripova, gvidate de kritika spirito de lukto kaj rezistemo kontraŭ la modeloj de regado kaj subpremo de la nuna socio.

La “Tagoj por la Memmastrumado 2012” okazis tiujare por la tria fojo kaj prezentis tre riĉenhavan programon, kiu kunigis ĉirkaŭ 250 personojn dum 4 tagoj.

Partoprenis la atelieron pri Esperanto dudeko da interesataj kaj entuziasmaj gejunuloj, kiuj igis la atelieron emocia kaj tre pozitiva.

Komence de februaro Kaj Tiel Plu koncertos en Can Piella.

## VIZITO DE KOREAJ AMIKINOJ

Fine de julio vizitis nin Sonĝanta, el Koreio. Akompanis ŝin kvin instruistinoj de alternativaj lernejoj.

Dum sia restado ili vizitis Barcelonon kaj la Muzeon de Esperanto de Subirats.

En C.A.T., kie kutime okazas la konversaciaj rondoj, la vizitantaj koreaj esperantistoj ludis por ni pupteatraĵon kun bela prezentado, muziko kaj kanto. Tuj poste,

## AKTIVA INFORMADO PRI KATALUNIO

La pasintan monaton mi partoprenis la fondan kunvenon de nova sekcio de la Kataluna Nacia Asembleo: Tradukistoj, Interpretistoj kaj Korektistoj por la Sendependiĝo. Amuzis min la ideo ke, iasence, ne necesas krei la sekcion “Esperantistoj por la Sendependiĝo”, ĉar ĝi jam ekzistas de jardekoj en la formo de KEA. Kiel, tamen, povas KEA agi por vere helpi nian nacian strebon sub la novaj politikaj kondiĉoj? Se internacia diskonigo de nia nacia projekto ĉiam estis nia celo, ni estas speciale devigitaj al tio en tiu ĉi jaro 2013, ĉar nia registaro mem finfine alprenis tiun saman celon, tiel gravan por sukcesa sendependiĝo.

Mi kaj Ramon Perera jam esperantigis tekston de la Kolektivo Emma, kiu aperis en ties retejo kaj ankaŭ en la germana retejo Esperantoland, kvankam estis precipe politika manifesto esprimanta la sintenon de tiu asocio kaj tial havis modestan valoron de informa vidpunkto. Ĉu ni subtenu tiun strategion de la Asembleo, kaj esperantigu tekstojn laŭ ilia mendo kaj elekto?

Aliflanke, grandan interesiĝon de la internacia esperantistaro pri niaj politikaj novaĵoj pruvas la artikolo pri la leĝoprojekto Wert kiun al Hèctor Alòs mendis kaj mem italigis itala esperantista retejo Disvastigo kaj poste republikigis Eŭropa Esperanto-Unio en sia decembra bulteno. Ankaŭ en decembro Mireille Grosjean, vizitante Barcelonon, intervidis min kaj aliajn por la radielsendejo Muzaiko kaj por verki artikolon por *Monato*. Tiu partopreno konvinkis min ke por pli serioze diskonigi niajn aferojn katalunoj mem devus iniciati informkampanjon antaŭ ol atendi ke fremdaj ĵurnalistoj venu intervidi la “indiĝenojn” eltironte nur banale personajn emociojn kaj opiniojn anstataŭ faktoj kaj argumentoj.

Tamen, ankaŭ mi sendis artikolon al *Monato* kiu estis malakceptita, mem spertante ke la ĵurnalisma ĝenro havas tro mallarĝajn limojn por serioza informado ĉar en Esperantio ne ekzistas gazetoj por tiel nomata “esplor-ĵurnalismo”. Estas Hèctor Alòs kiu plej kontentige sin elturnis en tiu mallarĝa kampo kaj delonge publikigadas katalun-temajn artikolojn en *Etnismo* kaj *Monato*, sed liaj artikoloj estas disaj kaj malfacile konsulteblaj en interreto. Miaopinie, la unua paŝo de tia informkampanjo estus kolekti en la retejo de KEA la tuton de liaj artikoloj, aŭ almenaŭ ligilojn al ili, por ke nia retejo fariĝu la unua haltejo kaj centra nodo por esperantistoj scivolemaj pri Katalunio. Due, ni devas esperantigi informoriĉajn artikolojn el la katalunlingva gazetaro (petinte permeson laŭbezone kaj liginte al originalo), ne nur manifestojn aŭ subskribitajn opini-artikolojn sed precipe la lastajn politikajn novaĵojn pri kiuj alilingvanoj malfacile povas informiĝi. Trie, por eviti la spacajn kaj temajn limojn de esperantaj gazetoj indus mem ekverki originalajn artikolojn aŭ raportojn por la interreto mem, kiu ankaŭ faciligas ligojn al originalaj fontoj tiel ebligante pli kredindan informadon. Tiujn tekstojn ni devus publikigi kun subskribo kaj malkaŝe liberaj kopirajtoj (ekzemple per permesilo Krea Komunaĵo, t.e. Creative Commons) por ke kiu ajn esperantisto ilin povu libere traduki en sian lingvon ne petinte permeson kaj publikigi en nacilingvaj retejoj aŭ gazetoj. Mi mem jam verkis tian raporton kiun plaĉus al mi vidi publikigita en la retejo de KEA. Do, ek al la laboro, ĉu ne?

Rubeno Fernández

ili klarigis pri la edukado en la sudkoreaj alternativaj lernejoj.

## PARTOPRENO EN INTERNACIAJ ARANĜOJ

Naŭ katalunoj, inter kiuj troviĝis kvin samasocianoj, partoprenis la 5an Someran Esperanto-Studadon (SES) organizita de Edukado@Interreto en Slovakio. Du el ili sukcese partoprenis la KER-ekzamen-sesion. Kiel kutime, nia kara asocianino Dolors Godoy denove ricevis la premion al la plej ĉarma maljuna partoprenanto. Viktoro Solé prelegis dufoje, kaj Xosé Conde dum la Adiaŭa Vespero brile kantis siajn proprajn mokajn versojn kiel amuzegan resumon de la aranĝo.

Dolors Godoy kaj Bel Sancho partoprenos ankaŭ la 79an Italan Kongreson de Esperanto en sicilia urbo Mazzara (itale Mazara del Vallo). Ĉi tiu kongreso aparte elstaris pro la forta engaĝiĝo de la urbestro, kiu eĉ sukcesis, ke la internacia lingvo estu instruata en la urbaj lernejoj. Ĉirkaŭ 500 lernantoj sekvas la kursojn.

## EN ASOCIA FOIRO DE LA KATALUNA LANDARO

Kiel kutime, la 11an de septembro, okaze de la nacia tago de Katalunio, nia asocio starigas budon en la Asocia Foiro de la Kataluna Landaro. Temas pri unu el la plej vizitataj foiroj, kaj la kunagado kun aliaj asocioj estas ankaŭ fruktodona.

Krom disvendi librojn kaj alian materialon pri lingva demokratio aŭ pri Esperanto, furoris la T-ĉemizoj faritaj de Mon Cardona.

Tamen, la plej grava celo de la budo estas informado. La dato estas ege taŭga por diskonigi la komencontajn kursojn de Esperanto, en kiuj partoprenas kontentiga kvanto da novlernantoj.

## ALVOKO AL LA MONDO

La pasintan 11an de septembro okazis en Barcelono enorma manifestacio por la resendependiĝo de Katalunio, en kiu partoprenis pli ol 1,5 milionoj da homoj.

Fine de la manifestacio, oni legis alvokon al la mondo en kelkaj lingvoj. La esperantan version legis Andreu Gestí, la plej juna membro de Kataluna Esperanto-Junularo.



*Viktoro Solé prelegis pri Esperanto en Aula d'Extensió Universitària Sènior en la UPC de Castelldefels*

En la mesaĝo Gestí diris: "Katalunio parolas al la mondo. Mi estas kataluno kaj mi diras al vi ke ni deziras, ke Katalunio iĝu nova ŝtato en la mondo. Hodiaŭ komenciĝas paca kaj demokratia procezo por igi Katalunion nova ŝtato en Eŭropo. Bonvolu subteni nian alvokon".

## EN UNIVERSITATO DE CASTELLDEFELS

La pasintan 23an de oktobro, kadre de la Aula d'Extensió Universitària Sènior en la UPC de vilaĝo Castelldefels (apud Barcelono), nia samasociano Viktoro Solé prelegis pri Esperanto. Antaŭ pli ol cent ĉeestantoj, la preleganto parolis pri kelkaj el la ĉefaj trajtoj de la internacia lingvo por klarigi, kial Esperanto estus bona solvo por internaciaj rilatoj. Inter tiuj karakterizaĵoj li parolis pri ĝia neŭtraleco (kultura, politika kaj socia), facila aliro, povo de la lingvo (esprimivo, fleksebleco kaj precizeco), propedeŭtika valoro kaj malferma komunumo.

La partoprenantoj montris intereson pri la temo kaj fine de la prelego ekis vico da demandoj. Ili temis pri la lingva evoluo, la kialoj, pro kiuj internaciaj institucioj ankoraŭ ne elektis ĝin kiel taŭgan solvon por internaciaj rilatoj, kaj kelkaj lingvemuloj starigis demandojn ankaŭ pri gramatikaj kaj fonetikaj trajtoj.

Rimarkindas, ke inter la ĉeestantoj estis s-ro Emilio Sanz, loka esperantisto, kiu iomete babilis esperante kun la preleganto, por ke la publiko aŭdu la lingvon en mallonga, sed reala interparolo.

## ICIP PUBLIKIGIS MONOGRAFION PRI LA KATALUNAJ ESPERANTISTOJ

La Internacia Kataluna Instituto por la Paco (ICIP) publikigis studon de Hèctor Alòs titolita "Els esperantistes catalans. Un col·lectiu pacifista en un món global" (Katalunaj esperantistoj. Pacisma anaro en ĉioampleksa mondo).

La monografio estis publikigita de ICIP en la kolekto Working Papers, per kiu la instituto celas krei malfermitan forumon pri temoj rilataj al paco, konfliktoj kaj sekureco. La celo estas malfermi debatadon kaj diskutadon pri la nuntempaj problemoj, teoriaj aŭ praktikaj, la tenado de la paco kaj la solvo de konfliktoj. Per tiu ĉi kolekto ICIP celas meti je ĉies dispono tekstojn alireblajn, valorajn kaj reviziitajn de spertuloj.

En ĉi tiu laboraĵo, Alòs unue skize prezentas la Esperanto-movadon, klarigante la ligojn inter pacismo kaj esperantismo, precipe en Katalunio. Tuj poste, surbaze de enketo al tiu subaro de la pac-movado, la esploro, unuflanke, komparas la ecojn de tiu kolektivo kun tiuj de la kataluna socio kaj de la esperantistoj en diversaj aliaj landoj. Aliflanke, ĝi analizas la grupon mem kaj la eventualan evoluon de la membroj.

## 125A ESPERANTO-TAGO

La pasintan 15an de decembro, Kataluna Esperanto-Asocio rememoris la 125an zamenhofan tagon iel speciale.

Matene gastigis la festadon la Muzeo de Esperanto de Subirats, kie Joan Inglada prezentis la verkaron de Anna Rosselló kaj Josep Travesset, katalunaj esperantistoj engaĝigitaj je la rajtoj de la senŝtataj nacioj, ĉefe de tiuj kiujn ili vizitis dum 8-jara vojaĝado tra Abya Yala, aŭ Ameriko laŭ la Konsilo de la indiĝenaj popoloj.

Vespere, la sidejo de la retgazeto *Vilaweb* gastigis rondan tablon pri lingva diverseco kaj paco kun la partopreno de la lingvisto Carme Junyent kaj la politologoj kaj pacaktivistoj Jordi Armadans kaj Xavier Alcalde. La debato estis vigla, partopreniga kaj tre profitdona. Samkiel matene en la muzeo, la partoreno estis multe pli alta ol antaŭvidite.

La festado finiĝis per komuna vespermanĝo en la restoracio Horiginal.

## KURSOJ DE ESPERANTO 2012-2013

Pasintokobre komenciĝis la kursoj pri Esperanto en diversaj urboj.

En Barcelono la partopreno estas rekorda en ambaŭ niveloj, t.e. komencantoj kaj progresantoj. Konversaciaj rondoj ankaŭ sufiĉe bone iras.

Estas ankaŭ kursoj en L'Hospitalet de Llobregat, Manresa, Oliva, Orpesa, Sabadell, Prada de Conflent, Valencio... kaj eĉ kurso per Twitter.

Pliaj informoj pri la kursoj de Esperanto troviĝas en la retejo de la asocio.

## VIGLA JUNA GRUPO EN OLIVA

Oliva Esperanto-Klub' estas la asocio el Oliva (Safor) kie deko da junuloj renkontiĝas ĉiumerkrede kaj ĉiuvendrede. Komprenbele ne mankas lecionoj, konversaciaj rondoj kaj kunridoj.

La juna, vigla kaj aktiva grupo pretigas renkontiĝon kiu okazos tie, en Oliva, venontjunie. Onidire ĝi estos plenplena da surprizoj.



## ESPERANTO*CAT EXIGEIX AL MINISTRE WERT LA RETIRADA COMPLETA I IMMEDIATA DEL PROJECTE DE LLEI

L'Associació Catalana d'Esperanto condemna de la manera més enèrgica la conducta antidemocràtica i genocida contra la llengua catalana, i occitana a l'Aran, per part del ministre Sr. Wert i exigeix la retirada completa i immediata del projecte de llei.

Ens adherim a la convocatòria de concentració feta per Somescola en defensa de l'escola catalana en català, el proper 10 de desembre, coincidint amb la commemoració del Dia Mundial dels Drets Humans. La concentració tindrà per lema: "Per un país de tots, l'escola en català" i tindrà lloc a 2/4 de 7 de la tarda a la plaça Sant Jaume de Barcelona.

## CAMPANYA DE SUPORT ALS 80 ANYS DE LES "NORMES DE CASTELLÓ"

L'Associació Catalana d'Esperanto mostra el seu suport a la plataforma Castelló per la llengua tot adherint-se a la crida en la defensa dels drets socials i lingüístics del poble valencià.

La campanya, posada en marxa en un moment de retallades en els drets lingüístics i socials, commemora els 80 anys de les «Normes de Castelló». Culminarà dissabte 15 de desembre amb una manifestació a Castelló de la Plana i diverses activitats entre les quals cal destacar el concert dels grups Obrint Pas, KOP i Agraviats.

Tot i coincidir amb la 125a Diada de l'esperanto, que enguany celebrem destacant la nostra tasca en favor de la diversitat lingüística i la pau, els drets lingüístics, entesos com a complement indissoluble dels drets humans són un dels valors principals de l'Associació Catalana d'Esperanto, i per això animem a recolzar la crida de la la plataforma Castelló per la Llengua, pels drets socials i lingüístics.

## NOVA PERAD-SISTEMO POR LA JARO 2013

Jam de longe nia asocio helpas siajn asocianojn kaj amikojn perante konsiderindan nombron da Esperanto-revuoj kaj aliajn servojn, kiel membriĝon al internaciaj eventoj kaj asocioj, kaj pri kiu ajn internacia transpago.

Tiucele Viktoro Solé, peranto de KEA, kreis por via helpo novan retpaĝon pri tiu servo. En ĝi vi trovos ĉiujn eldonaĵojn, kiujn ni peras kun informo pri abonkosto, enhavo, formato, ktp. Vizitu tiun retejon ĉe: *victorsole.com/esperanto/perado/*.